

Hermann Löns,  
Akvomuelilo ĉe Monastero

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Siringo kaj lilak' odore  
En mia laŭb' ĉirkaŭas min,  
Laburno-branĉoj pezaflöre  
Desupre pendoligas sin.

Jen kuŝas barko surrivere,  
Jen ŝprucas akvomuelil',  
Hirundoj ludas enaere,  
En fragmitar' libela bril'.

Mirinda estas la tremado  
De l' ondoj en la sunradi',  
La scintilado, la glimado, -  
Ne scias miajn pensojn mi.

*Traduko de la Germana poemo "Pleistemühle bei Münster" de HERMANN LÖNS (\*1866-08-29 - †1914-09-26) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1996.*

*MR-283-1a / Arg-358-711 (2006-03-31 10:07:33)*